

## Salutvorto de la redaktoro

**K**ARA LEGANTO

Estas ĝojo prezenti al vi la sesan kajeron de *Esperantologio!* Ĝi enhavas ses originalajn studojn: tri en esperanto kaj tri en la angla.

★

Wim Jansen prezentas grandan studon pri esperanto surbaze de la funkcia diskurs-gramatiko. Ĝi estas la unua studio pri esperanto uzanta tiun teorion, kaj ĝi estas ankaŭ la unua studio en esperanto pri iu ajn lingvo. Kromefiko de la artikolo de Wim sekve estas diskonigi kaj diskutigi esperantan version de la terminoj de la funkcia gramatiko.

★

Edmund Grimley Evans publikas studon pri literumiloj, t.e. komputilaj kontroliloj de literumado. Tiuj programoj povas fari erarojn de du specoj: *pretervidojn*, t.e. netrovitaj eraroj en la teksto, ankaŭ nomitaj *falsaj negativoj*; kaj *misavertojn*, t.e. indikoj ke iu vorto estus erara kvankam ĝi estas ĝuste skribita, ankaŭ nomitaj *falsaj pozitivoj*. Edmund starigas kriteriojn por juĝi literumilojn, esploras manierojn testi ilin kaj enkondukas novajn tiajn programojn.

★

Estas bone konate ke Zamenhof evoluigis sian lingvon *Lingvo universala* almenaŭ parte dum siaj medicinaj studoj en Moskvo dum du jaroj, 1879-08 — 1881-08; ke li en letero de 1901 skribis ke li nomas sin ne “ruso” sed “Rusujano”; ke li en 1907 nomis sian patrujon *Litovujo*; kaj ke li skribis en letero en 1912 ke oni ne nomu lin “polo”. Sed li ja ankaŭ permesis ke oni nomu lin “filo de pola lando” en tiu sama letero. Efektive li havis multnivelan identecon.

Bogusław Dopart kaj Sabina Bobran pentras vastan kaj samtempe detalan bildon de la kultura klimato dum la tempo de la junia Zamenhof. La nacia epopeo *Pan Tadeusz* de Adam Mickiewicz ludis gravan rolon en la demokratiga kaj moderniga transformo de la pola socio en la tempo de Zamenhof kaj en la plivastigo de la nacia identeco al malpli altaj sociaj tavoloj. Zamenhof sekvis la tradukon de la verko en esperanton fare de Antoni Grabowski. La biografio faras Ludovikon Zamenhof heredanto de la tradicio de la juda diasporo en Pollando, sed ankaŭ de la tradicio de la pola intelektularo, formita per la naciaj ideoj kaj la eŭropa universalismo, per la romantikisma simbolaro kaj la pozitivisma penso.

Mi menciu ke mi ne havis rektan kontakton kun la aŭtoroj Bogusław kaj Sabina — ĉion zorge peris la tradukinto Maria Majerczak.

\*

Wim Jansen revenas en la kvara artikolo kaj prezentas studon pri la refleksivo en esperanto. Lia lingvo ĉifoje estas la angla, sed li enmetis resumon kaj ampleksan antaŭparolon en esperanto.

La refleksivaj pronomoj estas problemaj el pluraj vidpunktoj — eble esperanto heredis problemojn de kelkaj el siaj fonto-lingvoj, nome de tiuj kiuj posedas refleksivon.

En la sveda — kiu estas proksime parenca al la jida, unu el la fontolingvoj de esperanto — ekzistas refleksiva pronomo kaj refleksiva poseda pronomo, ĉiome responda al la esperantaj *si* kaj *sia*. Mi ĉiutage rimarkas ke, eĉ en simplaj okazoj analogaj al (3) sur paĝo 76, la lingvouzo tre varias eĉ inter profesiaj verkistoj kaj L1-parolantoj de la sveda. Ĉu tiu lingvaĵo devus esti konsiderata kiel erara aŭ ne estas filozofia demando: mi nur povas observi la fenomenon, kiu iras kontraŭ la regulo kiu Wim nomas *the Main Rule* sur paĝo 78, kaj kiu identas al tiu en la sveda.

Mi emas pensi ke esperanto kaj la sveda estas en similaj ŝtupoj de evoluo, kie *the Main Rule* ofte — sed absolute ne ĉiam — estas sekvata en simplaj okazoj, kaj kie la lingvaĵo en pli komplikaj okazoj, kiel en (20) sur paĝo 89, varias forfore de ĉiaj priskriboj.

La Akademio de Esperanto en 1971 oficialigis regulon pri la refleksivaj pronomo kaj adjektivo, el kiu la lasta ero diras: “*IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.*”

Ni eble povas diri ke esperanto kaj la sveda estas subdeterminitaj kiam temas pri la refleksivo. Kaj ni povos vivi kun tio.

\*

Leif Nordenstorm, kiu publikigis recenzon en EES 5, nun revenas kun studio pri ŝerca lingvo nomita *Transpiranto*, kiun satira revuo en Svedio publikigis en 1929. Kvankam nuntempe oni imagas ke temas pri karikaturo de esperanto, Leif montras ke origine ne estis tiel: temis pri ŝerco pri la emo krei novajn planlingvojn.

\*

Vilius Normantas konsideras en la lasta artikolo de la kajero eblajn fontojn de tekstoj kiuj taŭgus por la kreado de korpusoj de esperanto. Speciale li diskutas la respondeojn al du demandoj:

- Kiom granda muestro de lingvouzo povus esti kolektita de certa fonto?
- Kiom maloftaj aŭ malfacile akireblaj estas muestroj de esperanto-uzado en la koncerna fonto? Pro tiu ĉi kriterio kelkaj relative malgrandaj fontoj estas inkluditaj.

La rezulto estas valora superrigardo de granda nombro da eblaj fontoj kun detala diskuto pri ties kvalitoj.

★

Pri la aperiga politiko de la revuo bonvolu legi en la *Notico de la redaktoro* en kajero 1 (1999:3–4).

La revuo estas ia daŭrigo de la revuo *Esperantologio*, kiun Paul Neergaard (1907–1987) redaktis kaj eldonis dum la jaroj 1949–1961. Aperis ses kajeroj ampleksantaj entute 424 paĝojn. Pli pri Paul vi povos legi en mia artikolo (2012).

Tamen en la nuna revuo ni komprenas per la termino *esperantologio* pli vastan sciokampon ol oni faris en tiu de Neergaard.

★

Mi esperas ke vi ĝuos la legadon!

*Christer Kiselman*

## Referenco

Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. **En:** Blanke, Detlev (red.), *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978 92 9017 117 1.

## A word from the Editor

DEAR READER:

It is a pleasure to present to you the sixth issue of *Esperanto Studies*! It contains six original articles: Three in English and three in Esperanto.

★

Wim Jansen presents a great study of Esperanto on the basis of Functional Discourse Grammar. It is the first study of Esperanto on this theoretical basis, and it is also the first study in Esperanto of any language. A secondary goal of Wim's study is therefore to make Esperanto terms of Functional Grammar known and have them discussed.

★

Edmund Grimley Evans publishes a study on spell checkers, i.e., computer programs that check the spelling of words in a text. These programs can make errors of two kinds: *false negatives*, i.e., omitting to signal errors in the text; and *false positives*, i.e., indicating that a word is misspelled although it is correctly written. Edmund establishes criteria for judging spell checkers, investigates methods to test them, and introduces new such programs.

★

It is well known that Zamenhof developed his language *Lingvo universala* at least partly during his medical studies in Moscow during two years, August 1879 — August 1881; that he in a letter of 1901 wrote that he calls himself not “ruso” but “Rusujano”; that he in 1907 called his fatherland *Litovujo* ‘Lithuania’; and that he wrote in a letter of 1912 “don’t call me a Pole.” But he also accepted to be called a “son of Poland” in that very letter. His identity was indeed many-faceted.

Bogusław Dopart and Sabina Bobran paint a broad and at the same time detailed picture of the cultural climate during the time of the young Zamenhof. The national epic *Pan Tadeusz* by Adam Mickiewicz was important for the democratization and modernization of Polish society in Zamenhof's time, and the broadening of a national identity to lower social strata. Zamenhof followed its translation into Esperanto by Antoni Grabowski. The biography shows that Zamenhof inherited the traditions of the Jewish diaspora in Poland, as well as the traditions of Polish intellectuals formed both by national ideas and a European universalism, and by the symbolism of Romanticism and Positivism.

Let me mention that I did not have direct contact with the authors Bogusław and Sabina; the translator Maria Majerczak served as our constant mediator.

★

Wim Jansen returns in the fourth article and presents a study of the reflexive pronouns in Esperanto. His language is English this time.

The reflexive pronouns are problematic from several points of view—maybe Esperanto inherited problems from some of its source languages, viz. from those of them which possess reflexive pronouns.

In Swedish—which is closely related to Yiddish, one of the source languages of Esperanto—there is a reflexive pronoun and a reflexive possessive fully analogous to the *si* and *sia* of Esperanto. I notice daily that, even in simple cases analogous to (3) on page 76, usage differs a lot even among professional writers and L1 speakers of Swedish. Whether this usage should be considered to be in error or not is a philosophical question: I can only observe the phenomenon as many phrases go against what Wim calls *the Main Rule* on page 78, and which is the same in Swedish.

I tend to think that Esperanto and Swedish are at similar stages of development, where the Main Rule is adhered to in simple cases most of the time—but by no means always—and where usage varies beyond description in more complicated cases, like (20) on page 89.

The Academy of Esperanto proclaimed in 1971 that expressions not conforming to the Main Rule are tolerated in some cases if greater clarity will result from this.

We might perhaps say that Esperanto and Swedish are underdetermined when it comes to the reflexive pronouns. And we can live with that.

★

Leif Nordenstorm, who published a review in EES 5, now returns with a study of a language called *Transpiranto*, published by a satirical journal in Sweden in 1929. Although nowadays it is generally thought that it was intended as a caricature of Esperanto, Leif shows that originally this was not so: It was a joke about the fad of creating new planned languages.

★

Vilius Normantas considers in the last article of this issue possible sources of texts suitable for the creation of corpora of Esperanto. In particular, he discusses the answers to two questions:

- How large a sample of language use could be collected from a particular source?
- How rare or difficult to obtain are samples of Esperanto use in that register? Due to this criterion, some relatively small sources are included.

The result is a valuable survey of a large number of possible sources, with a detailed discussion of their qualities.

★

For the editorial policy of the journal, please see the Editorial Statement in the first issue (1999:5–6).

The journal is a kind of continuation of the journal *Esperantologio*, which Paul Neergaard (1907–1987) edited and published during the years 1949–1961. Six issues were published, comprising a total of 424 pages. You can read more about Paul in my article (2012).

However, in the present journal, we use the term *esperantologio* ‘Esperanto Studies’ in a wider sense than one did in Neergaard’s journal.

★

I hope you will enjoy reading these articles!

*Christer Kiselman*

## Reference

- Kiselman, Christer. 2012. Paul Neergaard: sempatologo kaj esperantologo. In: Blanke, Detlev (Red.), *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*, pp. 19–33. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. ISBN 978 92 9017 117 1.